




K 30

Junio 1979

Kvaronjara eldono



Kiu uzas kion?

Vidu paĝon 2

KIU UZAS KION ? vidu frontpaĝon.

La kudristino kudras per ..... ilo.

La kombisto kombas per ..... ilo.

La hakisto hakas la arbon per.....ilo.

La tajloro tondas per .....ilo.


Maria lulas la pupon per.....ilo.

Per kio vi skribas? Mi skribas per.....

Per kio vi ŝlosas la pordon? Mi ŝlosas per.....

-----

KRUCVORTENIGMO



Horizontale

1. Vitra vazo por trinki.
5. Brileblanka valora metalo.
6. Perei en akvo

Vertikale

2. Nevariebla vorto esprimanta lokon, tempon aŭ manieron.
3. Tre malmola metalo.
4. Speco de nigra kaj malmola ligno.

(Solvoj sur paĝo 15)

Colin Quayle

ODORO KAJ SONO.

Vojaĝanto eniris restoracion; li malsatis kaj soifis kaj estis tre laca. Li eksidis en oportuna seĝo, trinkis kaj poste demandis la estron:

"Ĉu vi povas alporti al mi terpomojn kaj bifstekon? Pli ol duonan horon mi ne povas atendi."

La estro promesis. Tamen post tri kvaronhoroj la vojaĝanto ankoraŭ atendis ! Li ekstaris, pagis por la trinkaĵo kaj diris: "Pli longe mi ne povas atendi! Mi estas ne plu laca, mi ne plu havas soifon kaj mia malsato, nu ĝi estas kontentigita per la odoro el via kuirejo !"

La estro ekkoleris kaj diris: "Por la ĝuita odoro mi kalkulas duonan guldenon, sinjoro!"

Tamen la gasto rifuzis pagi.

Ĝuste tiam eniris sinjoro kaj ili rakontis al li la okazon petante, ke li solvu la problemon.

Post iom da pensado la sinjoro parolis: "La estro fakte pravas; estas juste, ke li ricevos ion por la ĝuita odoro!"

Kontraŭvole la vojaĝanto metis duonan guldenon sur la tablon; la estro jam faris gajan mienon. La sinjoro prenis la moneron kaj faligis ĝin, dirante al la estro:

"Ĉu vi aŭdis la sonon?"


"Jes"tiu ĉi respondis.

"Nu, la vojaĝanto kontentigis sin per la odoro de viaj mangaĵoj, vi do estu kontenta pri la sono de lia monero!"

La vojaĝanto reprenis la moneron kaj ridante foriris.

---

NE NUR RIDU, sed bonvolu ĝustigi la substrekitajn literojn!



1. En la fotelo estas porko.                   ootelo, oorko.
2. Elefanta piro problemas sur la tramo.  
    eleanta, iro, Proeas, trao.
3. Ĉirkaŭ lia rapo fumas granda muso.  
    apo, umas, muo.
4. Petro miras: "Ankaŭ mi estas azeno".   iras, anaŭ

5. Oni surpendigas la kantonon. surendigas, kanono.  
6. La muta familio rimarkas hunde la birdojn sur la maro.  
\_uta, riaras, \_unde, bidojn, mro.  
7. La ŝafisto pakas la veston. \_afisto, paas, \_eston.

\*\*\*\*\*

Ĉu vi povas fari similajn frazojn?

Jen kelkaj uzeblaj paroj!! pano ---nano, pipo--- pupo,  
koko ---kuko, miksi --- fiksi.

J Mikulas

(Solvo sur paĝo 15)

\*\*\*\*\*

ĈIE EN LA MONDO...

Ĉie en la mondo  
dancas infanar!  
dancas, jes dancas  
en urboj kaj kampar'.

Man' en mane dancas  
la tuta infanar'.  
Ne gravas la koloro  
de l'haŭto kaj la har'.

Eskimo de Gronlando  
kaj ruĝa indian'  
flava ĉinanino  
kaj nigra afrikan'.

Ĉie en la mondo  
dancas infanar!  
dancas, jes dancas  
en urboj kaj kampar'.



el bulteno de Kungälv's Esperanto Klubb.

Ni devas labori por ilia estonteco.



PRINTEMPA TRIUMFO.

Ĝojo, granda ĝojo al ĉiu estaĵo!  
Alvenas galope sur verĉ-blanka ĉevalo  
Printempo,  
la juna eta Princo,  
la karulo nia !

Super lia florkrono ŝvebas  
grandega papilio...

Ha! Vidu, la floroj kun berberoj  
denove verdiĝantaj  
gaje akompanas lin!

O.B.

(sur paĝo 6 vi vidos lin).

---

KAPRICA PRINTEMPO.

Mola kaj blanka	En la ĉielo	Aero malvarma
Neĝo neĝo	Flugludilo	Pluvo falas
Falis - falis	Turniĝadas	Subite la suno
Dum la nokto	En la Marta vento	Brile lumas.


Printempo, printempo  
Kaprica vi estas  
Tamen ni amas vin  
Venu - ni petas.

E.L.

---

Ĉu en via lando vi havas kvar sezonojn en la jaro?  
En Britio oni tre ĝojas pro printempo post la malvarma  
vintro.

L l L l



Morsa kodo:

L .-..









Mm M m

Morsa kodo: M - -

ABCĈDEFGĜĤHĪJJ̄K̄LMNOPRSŜTUŬVZ


abcĉdefgĝĥhij̄j̄k̄lmnoprsŝtuŭvz



INFANOJ DANCAS

Vortoj de B. Rijpstra

Hungara melodio.



Ki-am cedas vintro---plagoj an-taŭ venko de l' sun',  
kaj en belaj ma-jo---ta-goj floras kampo kaj dun',



Nin ar---baren vokas tonoj, tonoj de l' klari---on',  
ke ni dancu ĉe la sonoj en la ver--da sa---lon'.

2<sup>a</sup> rekantaĵo: Nin al kampo vokas tonoj, tonoj de l' mandolin',  
ke ni dancu ĉe la sonoj, knabo kaj knabin'.

3<sup>a</sup> rekantaĵo: Nin al kampo vokas tonoj, tonoj de la gitar',  
ke ni dancu ĉe la sonoj sur la herbo, laŭ par'.

4<sup>a</sup> rekantaĵo: Nin al kampo vokas tonoj, tonoj de l' violin',  
ke ni dancu ĉe la sonoj en la verda salon'.

-----  
Ŝercoj.

Tomaso: Kiom da fiŝoj vi kaptis, Johano?

Johano: Ho, mi ne povas nombri ilin.

Tomaso: Sed, mi vidas, ŝajne vi ne kaptis eĉ unu.

Johano: Ĝuste. Pro tio mi ne povas nombri ilin.

-----  
Urĝa mesaĝo al kuzcisto - Mia knabeto englutis plumingon.

Kion mi faru?

Respondo: Uzu krajon ĝis mi alvenos.

RIKARDO vera rakonto.

Iun tagon posttagmeze mi aŭdis hundidon malgaje bojanta. Pro sia dikeco ĝi ne facile moviĝis sur la verda herbejo kie mi vidis ĝin .

Post iom da tempo mi decidis, ke ĝi estis postlasita tie de malbonaj homoj, kiuj ne plu deziris prizorgi ĝin. Mi ne povis elteni la senesperan kriadon kaj prenis ĝin en miajn manojn dirante:

"Ho, mia kara hundeto venu al mia hejmo kun mi. Vi tre plaĉas al mi kaj mi vin prizorgos".

Kiam mi ĝin venigis hejmen, ĉiuj miaj gekatoj rigardis ĝin tre scivole. Nur Ĉarli kuraĝis proksimiĝi al la hundido, kiu jam ne plu senespere ploretis. Mi tuj donis al la hundido manĝaĵon. Poste ĝi dormis dolĉe kaj profunde.


Mi estis feliĉa, ke mi povis savi ĝin -- kaj mi nomis ĝin Rikardo. Tagon post tago mia aminda Rikardo kreskis, fariĝis pli bela . Ĝi estis tre ludema, vivplena. Ĝi atendis kun ĝojo mian revenon de laboro, ĉar ĝi sciis, ke ni ambaŭ promenos en la proksima arbaro. Ĉiam mi estis ege kontenta kaj feliĉa. Rikardo ja ne forgesis mian helpemon kaj ĝoje plenumis ĉiun mian peton. Li bone gardis la hejmon. Dum tuta jaro ni bone interkompreniĝis.

Sed iun tagon kiam mi estis for al la laboro kaj Rikardo estis laca kaj sola ĉe sia kabaneto ĝi estis buĉita per ĉasista tranĉilo. Mi neniam forgesos tiun tragedion. KIAL ONI TIEL AGAS kontraŭ hundeto?

Koncize mi rakontis - nur unu jaron Rikardo ĝuis la vivon. Mi estas ankoraŭ malgaja pro la perdo - la sensenca perdo -- la kruela perdo - de mia eta kunulo.

S Paŭnov Hungario.

ĈU VI IAM tondis diverskolorajn glupaperojn por fari bildojn? Jen tre simpla bildo: la deklivo verda; la strando flava; la boato bruna; la veloj ruĝaj; la nuboj blankaj. Kaj la maro?



Nu, se vi uzas bluan paperon al kiu vi gluas la bildon, tio povas esti la maro aŭ la ĉielo. Se ĝi reprezentas la maron tiam la ĉielo povas esti alia bluo aŭ grizo.

Ludmila Jevsejeva.

La Arbara Kuracisto

Se, en arbar!, ekmalsanas frakseno,  
Pino, aŭ kverko; jam tuj, en mateno

Venas helpisto,  
en ruĝa ĉapeto:

Ŝelon de arbo  
esploras beketo.

Tute senpaga  
kuraco kaj flego.

Dankon al kiu adresi ?

- Al pego !

.....



Letero el Gdansk, Pollando:

NEKUTIMA JUBILEO.

Ĝuste antaŭ 20 jaroj, en jaro 1959, mi, kiel instruistino de biologio en popollernejo ĉe Porinfana Sanatorio en Gdansk, enkondukis la lingvon Esperanto en eksterprogramajn okupojn por la malsanaj infanoj. Mi organizis infanan Esperanto-Rondeton, kun kies membroj dum la ĉiusemajnaj okupoj mi faris normalan lecionon de Esperanto, verkis leterojn al amikaj esperantistoj eksterlande, legis kaj tradukis leterojn de ili ricevitajn kaj preparis albumojn pri nia urbo kaj lando. Ne estis ebla fininstrui la infanojn, ĉar ili estis kaj estas kuracataj en la sanatorio dum 3, 4, 6 monatoj - nur malofte la tutan jaron. Tamen ili multon aŭdis pri la movado, iomete parolis kaj de tempo al tempo konatiĝis kun esperantistoj. Ili ĉiam portis el la sanatorio pozitivan scion pri Esperanto, kaj ofte daŭrigis la lernadon en Junularaj Kulturdomoj, aŭ eĉ en la lernejoj, kie Esperanto estas instruata.

En nia korespondado regis la Sullivana sistemo de Geonkloj Esperantistaj, pro kio kelkaj el ili ĝis hodiaŭ interesiĝas pri la Rondeto, korespondas daŭre, interŝanĝas ne nur leterojn, sed ankaŭ amikajn donacetojn/bildkartojn, landkartojn, albumojn, ktp.. Ĉar ĉio restas en la lernejo dum 20 jaroj amasiĝis granda kolekto de valoraj, ekzpozicieblaj objektoj, kiuj vekas interesiĝon de ĉiuj lernejanoj kaj lerneja stabo, helpante ofte eĉ kiel instruiloj por instruistinoj de geografio, historio, biologio kaj aliaj....

Krom la distra funkcio de Rondeto por la infanoj, ĝi plenumis gravan- kaj ofte agnoskitan de niaj kuracistoj - rolon en terapia procedo de junaj pacientoj. Fortiritaj de hejmoj, vivantaj en fremda medio, inter fremdaj homoj en blankaj kostumoj, ili trovas en kadroj de la Rondeto la novan, frapantan interesiĝon, ĝojon kaj ripozon de ĉiutagaĵoj: sariĝaj; kio mobilizas iliajn fortojn kaj imunecon en la batalo kun la malsano. Kaj pro tio en la nomo de

miaj lernejoj kaj iliaj familianoj kaj de la sanatoriaj kuracistoj mi tutkore dankas al ĉiuj, kiuj helpis al ni.

Entute dum 1979 la Rondeto havas 25 gekorespondantojn el 9 eŭropaj landoj kaj 10 el ekstereŭropaj landoj..... En ĉi tiu Internacia Jaro de Infano ni organizas ekspozicion dum Majo....

Volonte ni ricevos gratulojn kaj bondezirojn: nia adreso estas:

Infana Esperanta Rondeto  
en ĉeSanatoria Lernejo, Str. Polanki 119,  
PL 80,308 Gdansk, Pollando.

Janina Pieróg

-----  
Bedaŭrinde la supra informo ĵus mistrafis nian eldonon de Marto. Tamen vi ĉiuj skribos ĉu ne?  
-----

ERARO Claude Roux atentigas, ke la vorto junko(Juncus) en n-ro 28 paĝo 13, estas ilustrita per Typha. Typha kaj Junus estas tre malsamaj plantoj. Nur la dua troviĝas en P.I.V.(junko); la unua oni povas esperantigi en tifaŭ.

Latinaj sciencaj vortoj estas substrekitaj.

Mi tre dankas Claude Roux pro la atentigo - kaj petas pardonon de miaj legantoj, ke ĝi okazis.

NI VERKAS. Mi ĝojas, ke denove aperis nia suplemento. Mi bedaŭras, ke ĝi mistrafis la martan eldonon.

SPECIALAN POŝTMARKON. En februaro la svisa poŝto eldonis poŝtmarkon de valoro 0,70sFr. pro la Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno. Ĝi surhavas la Esperanto-balonon.

MONDA TURISMO. La turisma servo de Tejo eldonas ĉiujare Esperanto-Kalendaron pri okazontaĵoj: adreso Jagiellonska 12, PL85 067 Bydgoszcz. Pollando.

35-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto okazos en Austerlitz (Kom. Zeist) Nederlando, 20-a -27-a de Julio 1979.

VIDU estas informilo por vidantoj pri helpo al blindaj personoj. J.A Tuinder, Henegouwlaan 35 1966 RH Heemskerk, Nederl.

JUNULFAKO de SAT. Por informoj pri la junularo en SAT skribu al Anne-Sophie Levy, 37 Residence de la Madeleine, 78460 Chevreuse.... Francio...

SOLVOJ.

de paĝo 2 Kiu Uzas Kion?:

1. kudrilo    2 kombilo    3 hakilo    4 tondilo    5 lulilo  
6 skribilo    7 ŝlosilo.

Krucvortenigmo

Horizontale: 1. Glaso    5. Arĝento    6 Droni

Vertikale: 2. Adverbo    3. Ŝtalo    4. Ebono

de paĝoj 4/5 Ne Nur Ridu

Botelo - Korko; eleganta - viro - promenado - strato;

Kapo - zumas - muso ; Diras - antaŭ †

surbendigas - kanzonon ; Tuta - rigardas - lunde - bildojn - muro;

Pafisto - pafas - beston.

de paĝo 8 :

leontodo - libe~~to~~lokomotivo - lito - lulilo - lino - leporo -  
limako.

de paĝo 9:

mitulo - muso - muŝo - martelo - mevo - maizo - muelilo.-  
majuskloj - minuskloj.

=====

Ŝercoj:

En butikoj: "Unu kilogramo da miksitaj nuksoj mi petas, kaj  
ne tro multe da kokosoj".

Kial la birdoj flugas suden en la aŭtuno?  
Ĉar ne estas eble por ili piediri.

Kioma horo estas, kiam elefanto vizitas fajncan butikon?  
Horo por fermi la butikon. trad. E.L.

ADMINISTRACIO de KALEJDOSKOPO S.A.T. Gazeto por Geknaboj.

Redaktorino: Ethel Prent.

29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB, Anglio.

Telefona numero: 01-597 1347 (ne uzu 01 se vi estas en Londono)

La Jarabono por kvar eldonoj post ricevo de pago..... £0,75

Transpago de mono Bonvolu pagi per poŝtofaceja ĝiro, se tio eblas el via lando -al W E M konto 35 411 0004 (sama adreso). Aŭ al Perantoj- En diversaj landoj estas SAT-perantoj kaj UEA perantoj kaj tiuj transpagos por vi la abonojn. Petu de ni informon pri perantoj en via lando aŭ skribu al SAT Centro , 67 avenue Gambetta, Paris 75020, Francio, aŭ al UEA Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam NL-3C15 BJ, Nederlando.

Por kvantaj Mendoj. Por 10 aŭ pli da unu eldono al unu adreso ni ofertas rabaton inter 10% kaj 20%.

Nepagipovaj Landoj Kelkaj geamikoj donacas abonojn por infanoj kaj ĝeinstruistoj en tiuj landoj. Ni petas la ricevantojn de tiuj donacitaj abonoj, ke ili sendu poŝtkarton iam dum ĉiu jaro.

=====

#### LA REDAKCIO

bonvenigas verkojn kaj desegnojn de spertaj esperantistoj - ludojn, poemojn, ŝerojn, rakontojn, kiuj taŭgas por infanoj.

Dankon al ĉiuj, kiuj jam kunlaboris.

NI VERKAS - La REDAKTORO de "Ni Verkas" bonvenigas verkaĵojn de infanoj - sendu ilin al

Andre Gimbert  
10 Impasse Ayguepasse  
F-19100, BRIVE.  
Francio.